

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

AL NIA 41-A
KONGRESO

JUBILEA
SCIENCA
SESIO

HASKOVO '85

KONSULTIGO
DE SLEO-j

PRI IMPONA
LIBRO

„LA LASTA
BATALO”

BET EN
BUDAPEŝTO

ĈIU HONESTA
HOMO...

NIA E-JUNULARO
RAPORTAS



JARO 54 • N-RO 6 • JUNIO • 85

ESPERANTA PRINTEMPO EN ĤASKOVO'85

DONĈO ĤITROV



Sin prezentas nia plej juna E-generacio: grupeto el 125-a infangardeno, gajninta ĉi premion por muntaĵo

Trakia printempo! Suda printempo!...

La 1-an de aprilo Ĥaskovo varme bonvenigis 800 diversagaĵajn esperantistojn el ĉiuj partoj de la lando, venintajn en tiu granda, moderna distrikta centro de suda Trakio por partopreni en la XVIII Nacia Revuo de Esperanta Parolo kaj Kanto.

Tute ne hazarde Ĥaskovo estis elektita urbo-gastiganto de la jam tradicia tutlanda esperantista aranĝo. Ĉi-jare la urbo celebras sian miljaran jubileon kaj la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de sia fama civitano — la eminenta bulgara sciencisto, sociaganto-demokrato kaj granda amiko de Esperanto prof. d-ro Asen Zlatarov — patrono de la urba E-societo. Jam en la unuaj jaroj post publikigo de la projekto de d-ro Zamenhof pri Internacia Lingvo en Ĥaskovo aperas la unuaj esperantistoj, kiuj en 1903 fondas E-societon „Radio“. La distrikta esperantista organizaĵo kun prezidanto Nikola Pilev estas unu el la plej aktivaj en la lando.

En 1969 en Ĥaskovo okazis la IX festivalo de la bulgara E-junularo — unu el la plej bone organizitaj. Ankaŭ ĉi-jare la esperantistoj el Ĥaskovo montris bonegan organizan kapablon: ili disponigis ĉiujn necesajn kondiĉojn por fruktodona laboro de la partoprenintoj en la revuo.

La 31-an de marto je la 18-a horo en la plenplena de esperantistoj kaj gastoj salonego de la Domo de Sindikatoj estis solene inaŭgurita la XVIII Nacia Revuo de la Esperanta Parolo kaj Kanto.

Per varmaj salutvortoj la vic-prezidantino de la plenumkomitato de la Komunuma Popola Konsilantaro en Ĥaskovo Margarita Minčeva bonvenigis la partoprenantojn en la revuo. Si esprimis la kontentecon de siaj samurbanoj, ke Ĥaskovo duan fojon estas dommaŝtro de tia grava tutlanda esperantista aranĝo kaj bondeziris al ĉiuj partoprenantoj sukceson kaj agrablan restadon. Salutparolis ankaŭ fremdlandaj gastoj-esperantistoj — s-ino Elefteria el Greklando, s-ro Gyula Nagyszepetéri el Hungario kaj s-ro Abdulaj Togola el Malio.

Varme kaj emocie salutis la partoprenantojn Nano Kjuĉukov — vicprezidanto de BEA: „Ĉi tie, en Ĥaskovo — li diris, — sonos esperantaj parolo kaj kantoj honore al la paco kaj internacia sekureco, al la amikeco, interkompreniĝo kaj internacia solidareco de la popoloj, por feliĉa infaneco kaj vivo de la juna generacio de la tuta planedo...“

Kantu pri via socialisma patrolando, gloru per via inspirita esperanta parolo la kreaĵon laboron de la bulgara popolo!...

Mi elkore bondeziras al vi ĉiuj, karaj junaj amikoj, sukceson en la nobla konkurado!

Vivu la paco — necesa kiel la suno kaj aero por ĉiuj homoj sur la Terolo!...

En la jarprogramoj de Bulgara Esperantista Asocio ne estas pli amasa aranĝo ol tiu revuo, kiun partoprenas centoj da esperantistoj el urboj kaj vilaĝoj — infanoj, gejunuloj kaj plenaĝuloj. La naciaj revuoj de E-Parolo kaj Kanto estas veraj festoj de la tutlanda esperantistaro, okazo por manifestado de lingvaj kaj artaj kapabloj, por amikaj renkontiĝoj. Pli ol 150 plenumoj de preskaŭ 750 individuaj kaj kolektivaj plenumantoj en unu sola tago(!) estis aŭskultitaj kaj pritaksitaj far du kompetentaj juroj: por infanoj de 1-a ĝis 8-a klaso — Donĉo Ĥitrov, Maria Angelova kaj Angelina Sotirova, por gejunuloj de 9-a ĝis 11-a klaso kaj por plenaĝuloj — Violin Oljanov, prof. d-ro Stojan Ĝuĝev kaj Lidia Raeva.

Mi ne volus, ke oni opiniu min sentimentala, sed ne eblas resti indiferenta, aŭskultante kiel etuloj, inspirite kaj entuziasme deklamas kaj kantas pri venko de l'popoloj super faŝismo, glorigante la heroojn pereintajn por realigo de la helaj komunismaj idealoj!... Kaj ĉio ĉi — en Esperanto!... Kortuŝaj, emociplenaj momentoj!

(Sekvas sur p. 2)



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 54

JUNIO

6 • 1985

AL NIA 41-a KONGRESO

La bulgaraj esperantistoj renkontas sian 41-an kongreson kun faroj kaj atingoj, indaj por la fido fare de plej altaj partiaj kaj ŝtataj instancoj.

Dum la jaroj post la 40-a kongreso (1980) ili multon faris por plua popularigo kaj disvastigo de Esperanto en nia lando, plimultigis siajn vicojn per centoj da novaj membroj, konsiderinde plibonigis la organizan staton de la distriktaj organizaĵoj kaj de la apartaj lokaj E-societoj.

Ciam pli amase partoprenas diversaĝaj esperantistoj en la jam tradicion ĉiujaran Nacian Revuon de E-Parolo kaj Kanto, kiu manifestas la kulturen aktivadon de la bulgara esperantistaro, transformiĝas en kulturen feston por la logantaro de la loglokoj-dommastroj.

Multaj bulgaraj esperantistoj vikle aktivadis dum la UEA-kongresoj en Brazilo, Hungario kaj Kanado, partopreninte diversajn arandojn kaj programerojn. Niaj elstaraj E-kantistoj Veselin Damjanov, Maria Angelova, Mišo Zdravev, Dimităr Denčev k.a., kune kun la geaktoroj el la Bulgara Esperanto-Teatro bonege prezentis nian landon kaj E-kulturon antaŭ internacia publiko. Estigis jam tradiciaj la vizitoj de bulgaraj E-artistoj en Sovetunio, Hungario, Pollando, Ĉeĥoslovakio kaj en aliaj landoj, kie ili digne prezentas nian socialisman kulturon. La esperantistoj en la mondo nomas Bulgariion „verda lando“ — lando, kie estas multaj esperantistoj, kie la Internacia Lingvo estas bone akceptata de plej elstaraj ŝtataj kaj partiaj agantoj.

Multnombraj, interesaj kaj enhavoriĉaj estas la iniciatoj de la lokaj E-societoj en Bulgario: belartaj konkursoj, turismaj arandoj, renkontigoj de esperantistoj el diversaj distriktoj laŭ profesiaj interesoj ktp.

Ampleksa estas la eldonagado de BEA. Verkoj de talentaj bulgaraj poetoj kaj verkistoj aperas en Esperanto. Ili estas alte taksataj en la monda E-gazetaro, pliriĉigas la mondan E-kulturon.

La bulgaraj esperantistoj sin preparas por sia 41-a kongreso en tre maltrankvila interna-

cia politika situacio, kiam la imperiismaj militarismaj fortoj strebas kompliki la rilatojn inter la Oriento kaj Okcidento, strebas al milit-hegemonio super Sovetunio kaj la ŝtatoj-membroj de la Varsovia Kontrakto. Ardaĵ pacdefendantoj, la bulgaraj esperantistoj aktive agadas por starigo de amikaj rilatoj inter la popoloj pere de Esperanto. Pruvo pri tio estas ne nur ilia tre utila aktivado en la kadro de MEM, sed ankaŭ la du tre gravaj iniciatoj de la balkanaj esperantistoj: la Balkana Renkontigo en Bankja (1983) kaj la Unua Kongreso de Balkanaj Esperantistoj en Ateno (1984), kiuj multe kontribuis por proksimiĝo kaj amikiĝo de esperantistoj el la balkanaj landoj. La perspektivoj estas kuraĝigaj!

Tre vigla estis la agado de ĉiuj E-societoj dum la antaŭkongresaj monatoj, inspirita de la alvoko de CE de BEA pri aktiva aligo al la tutlanda esperantista konkurado — laŭ la anoncitaj kondiĉoj.

Menciinda estas la mastrumagado de BEA, kiu multe kontribuas por plimultigo de la naciaj kaj lokaj E-arandoj kaj por stabiligo de la financa stato de nia asocio ĝenerale.

En siaj distriktaj konferencoj la esperantistoj el la tuta lando jam elektis la novajn estrarojn kaj delegitojn de la 41-a kongreso de BEA. En la kongresurbon Sofio venos la plej meritoplenaj esperantistoj-aktivuloj, kiuj partoprenos la diskutadon de nova Statuto de BEA kaj la elekton de nova Centra Estraro de nia asocio. Tio estas grava kaj respondeca akto en la vivo kaj agado de Bulgara Esperantista Asocio, kiun ĉiu delegito plenumos kun profunda konvinkiteco kaj konscio pri la grandaj noblaj taskoj, starantaj antaŭ la bulgara esperantistaro: plua disvolvo kaj disvastigo de la Esperanto-movado en Bulgario; plua agado por konservo de la mondopaco; altkvalita produktado en la nomo de l'tutpopola prospero kaj bonstato, por plua florado de socialisma Bulgario.

Nia 41-a! Pruvo de nia esperantista sindonemo, de nia kapablo por realigo de noblaj taskoj!...

ESPERANTA PRINTEMPO...

(Daŭrigo de p. 11)



Solena inaŭguro de la XVIII Nacia Revuo de E-Parolo kaj Kanto. Salutparolas Margarita Minčeva, vic-prezidantino de la Komunuma Popola Konsilantaro en Ĥaskovo.

La festo jam estas for. Ĉiuj partoprenintoj jam estas hejme. Tamen vivaj estas la agrablaj rememoroj pri tiu nova esperantista manifestacio, vivaj estas la travivitaj emocioj.

La pritakso de la ĵurio, kiun mi prezidis, estas unuanima kaj mi esprimas ankaŭ la opinion de miaj simpatiaj koleginoj M. Angelova kaj A. Sotirova. Sur la scenejo en la salonego de la Junulara Domo recitis kaj kantis pli ol 75 individuaj kaj kolektivaj junaj plenumantoj (ĉirkaŭ 400 plenumantoj entute!) Kompare kun la pasintjara revuo en Plovdiv, ĉi-jare la lingva kaj arta nivelo estis konsiderinte pli alta. En la individua recitado kaj kantado montris vere artisman talenton Iliana Petkova el Stara Zagora, Mario Milčev el Slivnica, Katja Ivanova el Sofio. Bonan scenejan aranĝon kaj artisman plenumon manifestis la grupoj de junpioniroj el Svoĝe (arta gvidantino Lioneta Petrova), el Bankja (artgvidantino Ivanka Spasova kaj d-ro Kojčev), el Târgoviște (artgvidanto Emil Stefanov), la kant-instrumenta grupo el Ruse, „Verdaj Steletoj“ el Kjustendil (artgvidantino Maria Labova kaj Rumjana Nedelčeva) k. a. La kantgrupo „Buntaj Kravatoj“ el Bojuriște (artgvidanto Petăr Rusinov) estas imitinda modelo kaj ĝi plenumitis la specialan premion de la ĵurio. Sed jam estas kuraĝigaj plenumoj de junpioniraj grupoj el aliaj loĝlokoj, kiuj baldaŭ povus esti seriozaj konkurantoj! Tiuj tute objektivaj konstatoj kaj kvalifikoj de la ĵurio estas ĝojigaj, sed la premiitoj devas konservi la atingitajn rezultojn kaj en la venontaj revuoj montri ankoraŭ pli altan nivelon! Tiuj, kiuj ne gajnis premiojn, nepre devas turni atenton al certaj malperfektaĵoj de sia lingva kaj arta preparo,

konsulti spertulojn. La decido de la gvidantaro de la Internacia Infanasembleo „Standardo de la paco“ pri partopreno de junaj esperantistoj vaste malfermas la pordojn por ĉiuj, kiuj meritis partopreni en tiu alta internacia forumo! Bonŝancon! . . .

VIOLIN OLJANOV — prezidanto de la ĵurio por adoleskantoj kaj plenaĝuloj:

— Laŭ mi, en la ĉi-jara Revuo de E-Kanto kaj Parolo, la prezento de la grandaĝaj lernantoj kaj civitanoj estis je meza nivelo. Por la aŭtoritato de la movado la grupgvidantoj devas pli zorge kaj respondece prepari siajn programojn. La distriktaj estraroj devas anticipi kontroli la preparitecon de la kolektivaj kaj individuaj plenumantoj kaj ne allasi al la revuo plenumojn sub la necesa nivelo.

Oni devas ellabori striktan regularon de la revuoj, kiun la partoprenantoj devas koni almenaŭ jaron antaŭe. Gi devas fiksi la individuan tempodaŭron, la ĝenrojn, la nombron de programeroj, la kriteriojn de la ĵurio. La difinitaj nun ses poentoj ne sufiĉas por pli precize distingi la multnombrajn plenumojn.

Oni ofte forgesas, ke la celo de la Esperantorevuo estas apliko de Esperanto en la arto. Sekve, la kriterioj de pritakso diferencas de la kriterioj de la ĝeneralaj festivaloj, ĉe ni dominas la kvalito de la lingvouzo. Oni devas speciale atenti pri la artikulacio de la sonoj. Plenumiĝis kantadoj, ĉe kiuj la vortoj estas nekompreneblaj. Multaj plenumantoj reduktas la vokalojn, ne prononcas ilin klare. Precipe gratas la orelon prononcado de vokaloj „o“ kaj „e“.

Pro tio senbazaj estis la provoj de kelkaj ĉeestantoj (precipe ne-esperantistoj aŭ ne bone povosciantaj la lingvon) korekti la pritakson de la ĵurio.

Iuj lokaj aktivuloj subtakso la respondecon de la tradukanto. Tradukas tekstojn, eĉ versaĵojn kaj kantojn homoj, kiuj ne posedas la necesajn por tio sciojn kaj kapablon. Kaj poste oni miras, kial la kolektivo ne ricevis la atendantan altan pritakson. Se la gvidanto de la kolektivo akceptis tian tradukon, tio signifas, ke li ne havas la necesajn sciojn kaj ĝustan kriterion, kaj (kune kun la kolektivo) ricevas

la necesan sankcion. Gravas ankaŭ la elekto de la temoj kaj la kvalito de la plenumataj verkoj.

Ekde nun oni devas komenci prepari sin por la sekva revuo, kaj mi bondeziras pli altajn atingojn.


LIDIA RAEVA — membro de la ĵurio por adoleskantoj kaj plenaĝuloj:

— Mi konsentas kun la pli supre esprimita opinio — efektive oni ankoraŭ multon povus postuli de la partoprenantoj en la ĉi-jara revuo — arta nivelo, lingva nivelo, elparolo ktp. Sed ne estos juste ne konfesi, ke la ĝenerala nivelo ĉi-jare estis evidente pli alta kompare kun la pasintaj jaroj. Ĉiuj gejunuloj kaj iliaj gvidantoj, sendube, laboris serioze, strebis al plej bona, laŭdinda sinprezento.

Mankoj kaj malperfektaĵoj, nature, estis — pri ili oni jam menciis pli supre. Sed ĉu ili estas kulpo nur de nia bonega, talenta E-junularo, de la entuziasmoj, kiuj, malŝparante tempon kaj fortojn, preparas la gejunulojn? Eble jam maturiĝis la momento pensi pri pli serioza organizado de tiu nia plej amasa junulara festivalo, pri kreo de centra komisiono al BEA, kiu prizorgu kaj gvidu la preparlaboron. Krome, ĉu ne estas pripensinda la ideo pri establo de konstanta ĵurio el specialistoj, pri pli serioza difino de la kriterioj de prijuĝado — laŭ lingva nivelo, elparolo, artismo, muzikkapablo ktp.

Konklude mi volus atentigi pri jena konsidero: nia Revuo de E-Parolo kaj Kanto havas nur devigan temon kaj, respektive, nur devigan programon. Ĉu ne estus bone, se paralele kun la deviga programero ĉiu partoprenanto rajtu sin prezenti ankaŭ per programero laŭ propra prefero, laŭ libera elekto? Kiom mi scias, tiel estas ĉe ĉiuj altnivelaj konkursoj — muzikaj, baletaj, sportaj ktp. Al tiu penso min inklinigis la sinprezento de teatra grupo el Sumen per dramigo de la fabelo „Ora knabino“. La teatraĵeto ne estis tre altnivela, kaj tamen ĝi prezentis originalan reĝisoran solvon. Imagu, kiom multaj interesaj programeroj povus viviginiajn estontajn revuojn!

Do ni ne ŝparu fortojn kaj zorgojn por la prosperigo de nia jam tiom populara revuo — nia forĝejo de junaj, freŝaj, spertaj fortoj por la Movado, kaj tiuj zorgoj estos multoble rekompencitaj.



Junaj pacamikoj



La kantensemblo „Buntaj Kravatoj“ — Boĵuriŝte, gajninto de speciala premio



Mario Milčev el Slivnica gajnis la unuan premion por recitado (dua grupo)

LISTO DE LA PREMIITOJ

En la XVIII Nacia Revuo de E-Parolo kaj Kanto
en Ĥaskovo

INDIVIDUAJ PREMIOJ

RECITADO

1—4 klasoj

- I Iljana Petkova — Stara Zagora
- II Ljubomira Budinova — Velingrad
- III Nikolaj Trifonov — Ĉepelare
- III Stanimir Dinev — Botevgrad;
- III Ralica Ivanova — Razgrad

5—8 klasoj

- I Mario Milĉev — Slivnica
- II Mariana Ŝarlaganĝieva — Godeĉ
- II Svetla Stoeva — Samokov
- III Donka Veleva — Ĥaskovo
- III Janka Kaneva — Galábovo
- III Ilonka Kostadinova — Pleven

ARTA PROZO

5—8 klasoj

- I Daniela Kirilova — Ĥaskovo

KANTADO

1—4 klasoj

- I Ivan Paraŝkevoj — Jambol

5—8 klasoj

- I Katja Ivanova — Sofio
(Diplomo por akompanado al Manol Kovaĉev — Sofio)

RECITADO

9—11 klasoj

- I Janka Atanasova — Gabrovo
- II Diana Mladenova — Svoge
- II Galja Kalinova — Târgovište
- II Kalina Stojanova — Razgrad
- III Daniela Sirakova — Gorna Orjaĥovica
- III Albena Filĉeva — Sofio
- III Valentina Dimitrova — Jambol
- III Biserka Petrova — Pleven
- III Stajka Ĝibova — Sliven

RECITADO

18-jaraj kaj pli aĝaj

- I Dimo Penev — Varna
- I Grozdenka Filipova — Pazarĝik
- II Boris Bodiĉev — Varna
- II Veliĉka Vodeničarova — Velingrad
- II Stamenka Dimitrova — Botevgrad
- II Petja Serjanova — Veliko Târnovo
- III Ivanka Markova — Varna
- III Kapka Miladinova — Sofio

- III Ĥristina Nikolova — Pazarĝik
- III Nastenka Angova — Blagoevgrad
- III Ekaterina Stajkova — Ĉepelare

KANTADO

9—11 klasoj

- I Magdalena Ŝerbetova — Ŝiroka Lâka, distrikto de Smoljan
- II Kalinka Stojanova — Razgrad
- III Silvia Uzunova — Ŝiroka Lâka, distrikto de Smoljan
- III Snejina Simeonova — Ŝumen

18-jaraj kaj pli aĝaj

- I Elena Kojuharova — Varna
 - II Bonka Stefanova — Varna
 - III Minko Dikov — v. Galábovo, distrikto de Stara Zagora
- Kuraĝiga premio:
Juliana Rangelova — Botevgrad
Ivan Ŝopov — Plovdiv

KOLEKTIVAJ PREMIOJ

RECITADO

1—4 klasoj

- I Junpionira grupo — Svoge
(gvidanto Lioneta Petrova)

5—8 klasoj

- II Junpionira grupo — Bankja
(gvidantoj Ivanka Spasova, d-ro Kojĉev)
- II Junpionira grupo — v. Ljulin, distrikto de Pernik
- II Junpionira grupo — Burgas
(gvidanto Svetla Ĥristova)
- III Grupeto ĉe lernejo „Nikola Vapcarov“ — Târgovište (gvidanto Maria Rajĉeva)

9—11 klasoj

- I Grupo el faklernejo „M. Lomonosov“ — Sofio
- II Knabina trio — Plovdiv
- III Grupeto el Gabrovo
- III Lernejana klubo „Trifon Ĥristovski“ — Ĥaskovo

KANTADO

1—4 klasoj

- I Junpionira grupo ĉe lernejo „Nikola Vapcarov“ — Târgovište (gvidanto Emil Stefanov)

5—8 klasoj

- I Kantinstrumenta grupo — Ruse

9—11 klasoj

- I Grupo el la eksperimenta Esperanto-klaso ĉe VIII Unueca Politeknika Mezlernejo — Sofio
- II Grupo por politikaj kantoj „Zamenhof“ — Karnobat
- III Grupo „Berjozka“ ĉe la Lingva Gimnazio — Veliko Târnovo
- III Lernejana grupo — Gabrovo

Kuraĝiga premio: Pina Peneva kaj Anelia Georgieva
5—8 klasoj
(akompano — Ivelina Dimitrova) — Ruse

18-jaraj kaj pli aĝaj
I Grupo ĉe E-societo „Lumo“ — Plovdiv
II Horuso de instruistinoj — Pazarĝik
Kuraĝiga premio:
Rozalina Georgieva kaj Emilia Naĉeva—Rila

MUNTAJO

1—4 klasoj

I Grupeto ĉe 125-a infangardeno — Sofio
(gvidantino Maria Manolova)

5—8 klasoj

Speciala premio por altaj artaj atingoj — al la ensemblo „Buntaj Kravatoj“ el Boĵuriŝte kun gvidanto Petăr Rusinov

I Junpionira grupo „Verdaj Steletoj“ — Kjustendil
(gvidantoj—Maria Labova kaj Rumjana Nedelĉeva)

I Junpionira grupo ĉe la Domo de Kulturo „Janko Kirĉev“ — Jambol

(gvidantoj: Donka Pârvanova kaj Donka Mavrodieva)

II Junpionira grupo — Madan

(gvidanto Svetla Dineva)

Kuraĝiga premio por scenaro — al junpionira grupo el Dimitrovgrad

MUNTAJO

18-jaraj kaj pli aĝaj
I Grupo ĉe E-societo „Prof. Asen Zlatarov“ — Ĥaskovo
III Grupo „Serdika“ — Sofio

ORATORADO

I Rumjana Janeva — Gabrovo

TEATRA PREZENTAJO

II Teatraĵeto „La ora knabino“, plenumita de teatra grupo — Ŝumen

JURIO POR I KAJ II GRUPOJ:
Prezidanto: DONĈO ĤITROV
Membroj: MARIA ANGELOVA,
ANGELINA SOTIROVA

JURIO POR III KAJ IV GRUPOJ:
Prezidanto: VIOLIN OLJANOV
Membroj: prof. STOJAN ĜUĜEV

LIDIA RAEVA

Ĥaskovo,
la 1-an de aprilo 1985

REZULTOJ DE LA KONKURSO „PENJO PENEV“

En n-ro 6/1984 de „Bulgara Esperantisto“ estis anoncita decido de la Distrikta Estraro de BEA, de la Distrikta Konsilantaro pri Kulturo en Ĥaskovo kaj de la Komunuma Konsilantaro en Dimitrovgrad organizi konkurson pri traduko de verkoj de la poeto-esperantisto Penjo Penev el bulgara lingvo en Esperanton.

La konkurso estis organizita lige kun la 54-jara datreveno de naskiĝo de la poeto kaj la 25-jara datreveno de lia morto kaj celis popularigon de la poezia verkaro de Penjo Penev pere de Esperanto en Bulgario kaj eks-terlande.

Al la ĵurio en konsisto: **VIOLIN OLJANOV** — ĉefredaktoro de revuo „Paco“ (prezidanto), **DONĈO ĤITROV** — ĉefredaktoro de revuo „Bulgara Esperantisto“ kaj **LJUBA BOJAGIEVA**, E-poetino — estis prezentitaj 64 tradukoj de poemoj kaj versaĵoj fare de 21 konkursantoj.

La ĵurio opinias, ke ĉirkaŭ unu triono de la prezentitaj konkursaĵoj estas sub la necesa lingva kaj arta nivelo. Post zorgema pristudo, komparo kun la originaloj kaj objektiva pri-takso de la taŭgaj konkursaĵoj, la ĵurio dis-tingis jenajn tradukojn:

A. POEMOJ

I premio — „Tagoj de elprovo“ — Nikola Pilev, Ĥaskovo

II premio — „Patrujo“ — Asen Grigorov, Sofio

III premio — „Tagoj de ekzameno“ — Ljubomir Miĥajlov, Sofio

B. VERSAĴOJ

I premio — „30 centimoj“ — Asen Grigorov, Sofio

II premio — „Vojo“ — Nikola Uzunov, Ĥaskovo

II premio — „Mano“ — Tonka Dimitrova, Plovdiv

III premio — „Panjo“ — Ĥristo Gorov, Sofio

III premio — „Betono kaj revoj“ — Petăr Raev, Sofio


III premio — „Dimitrovgrad“ — Jeljo Delev, Dimitrovgrad

III premio — „Lulilo kaj kanto“ — Nikola Pilev, Ĥaskovo

Kuraĝigaj premioj:

— „Patrujo“ (poemo) — Rosica Lazarova, Pazarĝik

— „Varma blov' karesis“ — Atanas Kostadinov, Plovdiv



JUBILEA SCIENTA SESIO

(Omago al la E-pioniro Ĥristo Popov)

La 17-an de aprilo k.j. pleniĝis 120 jaroj de post la naskiĝo de la elstara esperantista pioniro, meritoplena instruisto kaj sociaganto Ĥristo Popov. Ĉi-okaze la 12-an de aprilo en u. Veliko Târnovo okazis Jubilea Scienca Sesio. Ĝin organizis la komunumaj komitatoj de BKP en la urboj Veliko Târnovo, Gorna Orjaĥovica kaj Dolna Orjaĥovica, la Unuiĝo de Sciencistoj en Bulgario — Filio Veliko Târnovo, kaj DE de BEA — Veliko Târnovo. Partoprenis pli ol 100 sciencistoj, esperantistoj kaj civitanoj el la distriktoj de Veliko Târnovo kaj Gabrovo. Honoris la Sesion per sia ĉeesto ankaŭ la sekretario de la Distrikta Komitato de BKP k-ino Kemalova. Oni faris du sciencajn raportojn kaj sep sciencajn informojn. Kortuŝajn rememorojn rakontis **Maria Kirĉeva**, filino de Ĥristo Popov.

En sia scienca raporto generalo **Konstantin Ĥristov** detale prilumis la kontribuon de Ĥristo Popov por enpenetro de la socialismaj ideoj en la regionon dum la lasta jardeko de 19-a jarcento kaj la unua jardeko de la 20-a jarcento. Paralele kun lia aktivado sur la esperanta kampo, li arde akceptis la socialismajn ideojn, starigis intimajn ligojn kun la fondinto de la socialisma movado en nia lando Dimitâr Blagoev kaj kun la arda propagandisto de la socialismo Nikola Gabrovski, kiuj dum tiu periodo loĝis en Veliko Târnovo. Post 1910 Ĥristo Popov deflankiĝis de politika aktivado, sed restis ĝis sia forpaso progresema socia aganto.

Olga Cankova, konata bulgara Esperanto-historiistino, faris detalan raporton pri la vivo kaj esperanta agado de Ĥristo Popov. Unu el la unuaj bulgaraj esperantistoj, li esperantistiĝis en 1889 kaj multon faris por la propagando de Esperanto en Bulgario: li eldonis tri lernolibrojn (1895, 1900, 1910) aperigis en la komencaj jaroj (1887—1901) proksimume 20 priesperantajn artikolojn en 9 bulgaraj gazetoj kaj ĵurnaloj, prelegis pri Esperanto en kelkdeko da urboj, partoprenis la redakciajn komitatojn de du esperantaj gazetoj, kelkfoje estis elektita kiel estrarano de BEA, en 1923 proklamita de la XX nacia bulgara Esperanto-kongreso kiel honora membro de BEA.

En sia scienca informo la supera asistan-

tino **Rosina Donkova** pritraktis la natur-sciencajn kaj etikajn-pedagogiajn starpunktojn en la artikoloj de Ĥristo Popov en gravaj bulgaraj pedagogiaj revuoj tiutempaj.

Tre valora estis la scienca informo de la ĉefasistanto **Angel Tonov** pri la belarta verkaro de Ĥristo Popov. Malgraŭ ke la nomon de Ĥristo Popov oni povas trovi en nenia literatura enciklopedio, li estas aŭtoro de atentindaj eroj — poezio, rakontoj, humoraĵoj, eĉ dramo. Al sia literatura verkado li rilatis kiel al plenumo de civitana devo, pro tio en lia verkaro estas tuŝitaj gravaj sociaj kaj etikaj problemoj. Estus nobla tasko de la nuntempaj literaturaj historiistoj elfosi la valoraĵojn el lia literatura heredaĵo.

Profesoro **Kiril Popov** el Sofio, konata esperantista aganto, dediĉis sian sciencon informon al unu el la multaj populutilaj okupoj de Ĥristo Popov — disvastigo de scienc-popularaj konoj pri la sano. Pri tiu temo Ĥristo Popov aperigis 27 artikolojn kaj informojn en la gazetaro.

Pri la aktivado de Ĥristo Popov en la pola legejo de lia urbo Dolna Orjaĥovica (tiam vilaĝo) parolis **Pavlina Popivanova**. Ĥristo Popov iniciatis la fondon de la legejo en 1883, kelkfoje li estis ĝia prezidanto, multe kontribuis por la konstruo de propra legeja domo. Krom la kutima aktivado — aranĝo de biblioteko, popular-sciencaj prelegoj, amatoraj teatraĵoj, Ĥristo Popov obstine okupis sin pri kolektado de folklorajĵoj el la regiono, pri eltrovo kaj konservado de historiaĵoj. Parton de la kolektitaj folkloraj materialoj li presigis siatempe, aliaj restis en manuskriptoj.

Virjina Popova, ĵurnalistino el Varna, tre bone prezentis la ĵurnalan kaj publicistan laboron de Ĥristo Popov. Enviinda estas lia aktivado sur tiu kampo, malgraŭ ke li ne estis profesia ĵurnalistino.

La supera scienca kunlaboranto **Marin Kovachev** faris bibliografian revuon de la publikaĵoj de Ĥristo Popov, kaj de publikaĵoj pri li, kiel ankaŭ de liaj tradukoj. En apartaj eldonoj aperis 6 libroj de Ĥristo Popov, kaj 7 liaj tradukoj estas eldonitaj libroforme. Li kunlaboris al 19 bulgaraj periodaĵoj. Pri la vivo kaj agado de Ĥristo Popov aperis en la gazetaro 25 materialoj.

Profesoro **Nikola Nikolov**, prezidanto de la filio de la Unuiĝo de Sciencistoj (Veliko Târnovo), faris konkludan paroladon. Li substre-
kis, ke la prezentitaj sciencaj raportoj kaj in-
formoj havas altajn sciencajn kvalitojn kaj
estos eldonitaj libroforme de la Stata Univer-
sitato „Kiril i Metodij“ en Veliko Târnovo.

Gojiga surprizo estis la disdono al la
partoprenantoj en la sesio de la libreto „Hris-
to Popov. 1865—1945. Bibliografio.“ Ĝi es-
tas verkita de Bojidarka Červenкова kaj
Hristina Karamihova, bibliografoj en la Dis-
trikta Biblioteko „P. R. Slavejkov“ en Ve-

liko Târnovo kaj eldonita de la biblioteko.
Ĝi entenas 143 bibliografiajn erojn kaj tripa-
ĝan biografian dataron, verkitan de Olga Can-
kova.

La saman vesperon en la legeja salono de
u. Dolna Orjaĥovica okazis tuturba solenaĵo
omaĝe al la memoro de Hristo Popov kaj lia
filo Kiril Popov, same esperantisto, aktiva kom-
somola aganto, kruele mortigita de agentoj
de la bulgara faŝista polico en Bukareŝto en
1925, kie li estis studento. Ĉi-jare pleniĝas
85 jaroj de lia naskiĝo.

Kr. KARUCIN

XVIII KONSULTIĜO DE SLEO-J DEKLARO

Inter la 15-a kaj 20-a de aprilo 1985 en
Pisanica — Internacia Esperanto-Kursejo, oka-
zis la 18-a Konsultiĝo de Reprezentantoj de Es-
peranto-Organizaĵoj el Socialismaj Landoj. Ĝin
partoprenis delegitaroj de Esperanto-organi-
zaĵoj el Bulgario, ĈSSR (Ĉeĥa kaj Slovaka As-
ocioj), GDR, Hungario, Kubo, Pollando, Ru-
manio (observanto), Soveta Unio kaj Vjetna-
mio. La partoprenintoj substrekiis la respon-
decon de siaj asocioj en la tutmonda E-agado
kaj en la batalo por konservado de la paco kaj
por malmarmado. Ili omaĝis al la 40-a datreveno
de la venko super faŝismo kaj salutas la
unuflankan paŝon de Soveta Unio pri haltigo
de la lokigado de raketoj, atendante adekvatajn
reagojn flanke de Usono. La delegitaroj
interŝanĝis spertojn pri la agado de siaj as-
ocioj por la komuna progreso de la Esperanto-

movado en nacia kaj internacia niveloj.

La partoprenintaj asocioj

— difinis taskojn por kunlaboro inter si;

— emfazis la gravecon de kunlaboro kun
neesperantistaj soci-utilaj organizaĵoj por re-
ciproke kontribui por atingado de komunaj celoj
kaj por antaŭenigi sciencon rekonon de la va-
loroj de Esperanto kiel komunikilo;

— substrekiis la gravecon de faka aplikado
de Esperanto;

— interkonsentis pri aktivecoj prepare al
la 100-jara jubileo de Esperanto surbaze de la
jubilea laborplano de UEA.

La delegitaroj dankas al Bulgara Esperan-
tista Asocio pro la ekskluzive bonaj laborkon-
diĉoj.

Pisanica, 20. 04. 1985



Partoprenintoj en la XVIII Konsultiĝo de SLEO-J

NIA HONORA PREZIDANTO



Fine de la pasinta jaro Ilija Ilijev estigis sepdekjara. Li havis malriĉan kaj pezan juncon. Fininte nur ses klasojn, dekdujara li disiĝis kun la lernejo pro manko de monrimedoj. En sia unua versaĵo li skribas: „Nur en lernejo la tagoj fluas plenfeliĉe“.

En 1931, apenaŭ deksesjara, li komencis labori — partoprenis sekigon de la marĉoj apud Nesebâr, kie malsaniĝis je malario. Tie li konatiĝis kun progresemaj ideoj kaj laboristaj bataloj. En la sama jaro li eksciis pri la Internacia Lingvo. Kun sia amiko, la juna poeto Marin Bâlgarenski — Rinma, ambaŭ komencis lerni Esperanton aŭtodidakte.

La sekvan jaron ili trovis E-adeptojn kaj komencis lerni kune. Ilijev klarigis gramatikajn regulojn kaj kontrolis akcentadon. Tiel vole-nevole li estiĝis kursgvidanto. En 1932 en lia vilaĝo Mleĉevo estis fondita abstinentula societo, en kiu membris preskaŭ ĉiuj progresemaj junuloj. Ĉe ĝi estis malfermita esperanta kurso, gvidata de Ilijev. Ĝis la fino de 1940 li gvidis naŭ kursojn por komencantoj kaj progresintoj laŭ la libro „El-lernu“ de hungara aŭtoro. Intertempe li finis kiel privata lernanto la lastan klason de progimnazio kaj la plenan kurson de gimnazio. Dum tiu periodo li laboris kun junuloj por fondi nelegalan partian organizaĵon, sed la polico malkovris tion kaj malhelpis. Malgraŭ tio la konspira agado daŭris, kaj en 1939 estis fondita partia grupo, kies ĉiuj membroj estis esperantistoj.

En 1937, kiam la esperantistoj jam estis pli ol dekkvin, en Mleĉevo estis fondita esperanta societo „La verda karavano“ (laŭ la versaĵo de Rinma, kiu iĝis societa himno). La melodion komponis la gimnaziano Conko Gâlâbov. Do la E-societo en Mleĉevo eble estas ununura vilaĝa societo en la mondo, kiu havis propran himnon kun aŭtoro kaj komponisto el inter siaj membroj. La esperantistoj estis tre aĝemaj: kunlaboris kun la abstinentula societo, kun la junulara kooperativa grupo, kun la legosocieto. La E-societanoj eldonis murgazeton, organizis prelegojn, aranĝis teatraĵon kun progresema kaj esperanta enhavo, eĉ kun esperanta teksto.

En la printempo de 1941 Ilijev jam laboris en la kooperativo en vilaĝo Hirevo. Tie li daŭrigis sian kultur-klerigan kaj konspiran agadon. Laboris en la amasaj organizaĵoj, helpis la formiĝon de RMS-organizaĵo (organizaĵo de la laborista junularo en Bulgario), kiun li gvidis, kaj de partia grupo, malfermis kurson de Esperanto. Sed en la komenco de 1943 la faŝista polico malkovris la konspiran laboron en la regiono de Sevlievo. Ilijev estis arestita, inkviziciata kaj malliberigita en la prizono de Târnovo.

Malgraŭ ke li ricevis mortverdikton, li ne ĉesis labori por organizi kultur-klerigan kaj politikan edukadon de la junaj malliberuloj, gvidis kurson de Esperanto kaj parolantan rondon, aktive partoprenis kulturajn aranĝojn de malliberuloj.

Lia prizona kursano Nenĉo Marinov interalie skribas: „... Mi forgesos neniam nian kamaradecon, niajn idealojn, kiuj nin ligis kaj la batalon, en kiu vi ne bedaŭris eĉ pri via vivo...“.

En la publikigitaj rememoroj de Todor Dimitrov ni legas: „... Stranga persono estis la mortkondamnito Ilija Ilijev. Tiu tre modesta homo posedis multajn sciojn el la sfero de scienco — li estis vera enciklopedio. Li kompetente respondis al direktitaj al li demandoj el la sfero de natur-matematikaj kaj soci-politikaj sciencoj, historio, ekonomio, filozofio, eĉ teologio. Li sciis parkere multajn versaĵojn de progresemaj niaj kaj fremdaj poetoj, tre ŝatis deklami versaĵojn de Smirnenski kaj Geo Milev.“

Post la popola venko dum kelka tempo li laboris en sia naskiĝvilaĝo, revivigis la E-societon, denove organizis parolantan rondon. Li finis foreste Superan Partian Instituton kaj superan klercon pri ekonomiko.

Pli malfrue Ilija Ilijev fariĝis membro kaj estraro de la Sevlieva Esperanto-societo kaj dum pluraj jaroj estis ĝia prezidanto. Li denove gvidis kursojn, kunordigis la esperantan agadon kun la kultur-klerigaj aranĝoj de la amasaj organizaĵoj. Kiel ĉefredaktoro de la regiona semajna ĵurnalo li ofte propagandis sur ĝiaj paĝoj la E-ideojn.

Dum sia vivo Ilija Ilijev gvidis pli ol

dudek kursojn, elprovis diversajn instrumentadojn, kiujn li ĝeneraligis en unu versaĵo — por pli facila ekmemoraro. Ĉiam kaj ĉie li propagandis la Internacian Lingvon. Pro liaj meritoj al la E-movado en Sevlievo li estas honora prezidanto de nia E-societo.

Nenka LJUBENOVA,
prezidantino de E-societo
„Fratiga Stelo“ — Sevlievo

VIVO EL FESTOJ



Naskita en 1905 en Sofio, Radka Rajnova kreskas en E-familio. Sia frato, la fame konata Atanas D. Atanasov (ADA) kuraĝigas ŝin lerni Esperanton. En ilia hejmo ofte venas gastoj-amikoj, parolantaj la Internacian Lingvon. Radka englutas la vortojn, la frazojn kaj en la gimnazio jam parolas Esperanton. En 1920 ŝi eniras en la E-movadon, estiĝas membro de la Sofia E-societo, regule vizitas la kunvenojn, partoprenas diversajn societajn iniciatojn, landajn kaj internaciajn kongresojn.

Dum kelkaj jaroj Radka Rajnova estas membro de la Centra Estraro de BEA, gvidas kursojn. Okaze de la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio (1963) ŝi ricevas la taskon gvidi la Internacian Infanan Kongreseton. Por ŝi kaj por kelkaj aliaj esperantistoj la tagoj de la preparado estas tagoj de malfacila, streĉa laboro. Laŭ preparita programo bulgaraj infanoj partoprenas la aranĝojn kaj estas veraj, bon-

kvalitaj helpantoj. Kiel gastigantoj, ili akceptas kaj prizorgas siajn etajn samideanojn, venintajn el diversaj partoj de la mondo. La rezultoj estas kontentigaj. Venas novaj taskoj por Rajnova. UEA invitas ŝin kiel helpanton-gvidanton de la 9-a Infana Kongreseto en Roterdamo. Ankaŭ tiun komision ŝi plenumas perfekte. La sekvontan jaron ŝi denove laboras kiel organizanto de la 10-a Infana Kongreseto en Budapeŝto. En 1972 bulgaraj esperantistoj gastas en GDR. Tie Rajnova prelegas pri la evoluo de la E-movado en Bulgario.

La E-agado de Radka Rajnova estas por ŝi feliĉe travivitaj festoj! La infanajn kongresetojn, la renkontiĝojn dum naciaj kaj internaciaj kongresoj ŝi neniam forgesos!

Kompreneble, s-ino Rajnova ne restas flanke de la socia vivo. Ŝi estas aktivulino en la virina movado, en la Patrolanda Fronto, organizas la kulturalan vivon en la kvartalo, kie ŝi loĝas.

Kiel esperantistino, Radka Rajnova dediĉas siajn fortojn precipe al la infanoj. Nun tiuj infanoj elkreskis. Multaj el ili nun estas esperantistoj kaj certe memoras onjon R. Rajnova! Iuj ankoraŭ havas korespondadon kun ŝi, kaj ĝojigas ŝin okaze de diversaj festotagoj. Eble ili ankaŭ nun povus kanti la Marŝon de la 10-a Infana Esperanta Kongreso, verkitan de la fama hungara poeto Julio Baghy. . .

Nun, kiel membro de la Sofia E-societo „Nikola Botuŝev“, ignorante la pezan ŝarĝon de siaj 80 jaroj, s-ino Radka Rajnova trovas tempon kaj fortojn vikle kaj aktive labori por Esperanto.

Okaze de ŝia 80-jara jubileo ni la esperantistoj el E-societo „Nikola Botuŝev“ sincere gratulas ŝin kaj bondeziras al ŝi sanon kaj longan, ĝojplenan vivon!

Liliĵa KOLEVA

MANIFESTIGOJ DE BET EN BUDAPEŬTO

De la 22-a ĝis 26-a de marto j. k. en Budapeŝto okazis la Internacia Esperanta Teatra Festivalo. Ĝin partoprenis hungaraj Esperantaj trupoj kaj la Bulgara Esperanta Teatro. Entute estis prezentitaj 6 teatraĵoj. La Festivalo finiĝis per ferma parada revua programo.

La dommastroj prezentigis per kelkaj surscenigoj: „Betonterapio“ de J. Elem, „La damo de l'fatalo“ de E. Tabi, „Letero al la akademio“ de F. Kafka, „La lasta magnetofonbendo“ de S. Beckett kaj la pupteatra spektaklo „Johano la Brava“ de S. Petöfi. La artistoj ludis bonege. Aparte brilan sukceson havis la komedio „La damo de l'fatalo“ — kaj pro la streĉa enhavo de la teatraĵo, kaj pro la talenta ludo de la geaktoroj.

La Bulgara Esperanta Teatro prezentigis per la komedio de Jordan Jovkov „La milionulo“. Sub la gvido de la merita aktorino Gertruda Lukanova la entuziasma kolektivo de BET gajnis la admiron kaj la tondrajn aplaŭdojn de la multnombra publiko en teatro „Radnoti“. Tio estis nova paŝo sur la vojo al firmiĝo de la renovigita konsisto de BET, sur la vojo al sukcesoj.

En Budapeŝto BET plenumis ankaŭ sian patriotan devon: por la bulgaroj loĝantaj en Budapeŝto ĝi faris bonegan koncerton bulgaringve. Ĝin organizis la Bulgara Kulturkleriga Societo „Georgi Dimitrov“ en Hungario. Per siaj recitaĵoj kaj abunda humuro la geaktoroj Belka Beleva, Veneta Zjumbjuleva, Lili Naumova, Ivan Zlatarev, Nikolaj Uzunov kaj Nikolaj Ivanov kaj la kantistino Maria Angelova jen provokis humidon en la okuloj pro nostalgio al la patrolando, jen ridigis neteneble la pli ol 300-homan publikon. En la programo aparte elstaris la unuaktaĵo „Divorco“ de Nadeĵda Slonova, majstre prezentita de la konata geaktora paro Belka Beleva kaj Anani Anev. Ĉio ĉi permesis al la sekretario de societo „G. Dimitrov“ Todor Kalicov deklari, ke en la 25 jaroj, dum kiuj li okupas tiun postenon, tio estas unu el la plej brilaj programoj, kiujn gastantaj trupoj prezentis al la loĝantaj en Budapeŝto bulgaroj.

La sukcesaj manifestigoj de BET en Budapeŝto inspiras la geaktoran kolektivon ankaŭ pli fervore prepari sin por la Universala Kongreso de Esperanto en Aŭgsburgo, kie ĝi prezentos la komedion „Tri viroj en la neĝo“ — dramigo laŭ la samnoma romano de Erich Kästner kaj la teatraĵon „La aŭgsburga kretociklo“ de B. Brecht.

K. IVANOV

PLENKUNSIDO DE LA SOFIA URBA ESPERANTO-ORGANIZAJO

La dudeko da sofiaj Esperanto-societoj efektivigis multflankan aktivadon, plimultigis la nombron de siaj membroj kaj multon faris por popularigo kaj disvastigo de la Internacia Lingvo inter la loĝantaro en siaj subdistriktoj.

Por plibonigi la organizan laboron kaj la kontaktojn de la sofiaj E-societoj la 23-an de aprilo j. k. la Urba Estraro de BEA en Sofio okazigis plenkunsidon, en kiu oni pridiskutis la raportojn de ties sekretario Ivan Peev kaj de d-ro Balĉev, prezidanto de E-societo „Nikola Botuŝev“.

D-rino Cveta Stamenova, prezidantino de la Sofia Urba Estraro de BEA, malfermis la plenkunsidon per varmaj salutvortoj kaj prezentis al la ĉeestantoj la karajn gastojn el foraj Kubo kaj Vjetnamio: Andrĉs Piñera — vicprezidanto de KEA, Ngugen Dinh Hien — vicprezidanto kaj Dang Dinh Dam — sekretario de Vjetnama Pacdefenda Esperanto-Asocio, kiuj vizitis Bulgarion lĝe kun la XVIII Konsultigo de Reprezentantoj de E-Asocioj el Socialismaj Landoj.

Per kortuŝaj vortoj Andrĉs Piñera kaj Ngugen Dinh Hien dividis siajn impresojn pri Bulgario kaj pri siaj kontaktoj kun bulgaraj esperantistoj. Emociiga momento estis la tralego far Ngugen Dinh Hien de la poemo „Bulgario“ de vjetnama poeto Dao Anh Kha — inspirita himno pri nia socialisma patrolando.

En sia raporto la sekretario de la Sofia Urba Estraro de BEA Ivan Peev objektivite pritaksis la organizan staton de la ĉefurbaj E-societoj, kies membraro konsiderinde kreskis dum la lastaj monatoj de la pasinta jaro. Li esprimis sian maltrankvilon rilate, la laboron kun la junularo kaj skizis kelkajn celkonformajn proponojn, kies realigo povus kontribui por la juniĝo de la ĉefurbaj E-societoj.

D-ro Marin Balĉev detale informis pri la agado de E-societo „Nikola Botuŝev“, kiu estas unu el la modelaj laŭ sia ampleksa multflanka aktivado. La raportinto emfazis la akran neceson pri konvenaj propagandaj materialoj, por ke la societoj povu pli sukcese diskonigi Esperanton al pli vastaj socimedioj.

Post vigla diskutado de ambaŭ raportoj kaj surbaze de la faritaj proponoj por plibonigo de la organiza stato, la Plenkunsido aprobis rezolucion.

La decidoj de la okazinta Plenkunsido nepre kontribuos por plibonigo de la laboro de l' Sofia Urba E-organizaĵo.

Radi BANĈEVSKI

„LA LASTA Batalo“

(REMEMOROJ)

En la Patrolanda Milito mi partoprenis kiel aktoro en la fronta teatro „Tribuno“, organizita ĉe Unua Bulgara Armeo.

Plej ofte niaj spektakloj okazis sub libera ĉielo — kiel lumĵetilo al ni servis la suno mem, la arbaroj kaj la kamparo estis nia dekoracio. Fajfado de obusoj, aviadila bruoj aŭ proksima krakado de mitraloj estis niaj postkulisaj efektoj. Ili estis neeviteblaj, ĉar tiam ni efektive troviĝis je 200—300 metroj, iufoje eĉ pli proksime de la fronta linio.

Kaj nia publiko? Oni sidis aŭ estis duonkuŝanta, apogante sin sur la kubuto, sur la nuda tero mem, plu tenante en la manoj sian armilon. Niaj spektakloj estis festo por la batalantoj. Ni alportis al ili salutojn el la patrolando, la bonodoron de la patrolanda tero. Kun varma rigado kaj tremetanta koro sekvis ili ĉiun nian vorton, ĉiun nian geston kaj reagis spontane.

Sed ne ĉiuj niaj spektakloj pasis trankvile. Ekaŭdinte la signalfajfilon de la deĵoranta oficiro, kiu avertis pri apero de malamikaj aviadiloj, ni ĉesigis la prezentadon kaj kune kun nia publiko kuris al la proksimaj tranĉeoj.

Nia fronta teatro „Tribuno“ vizitis multajn armeunuojn sur la fronto en Jugoslavio kaj Hungario, atingis kune kun la batalantoj eĉ ĝis Aŭstrio. Kiel ĉiuj ceteraj, ni havis niajn gajajn kaj malgajajn tagojn, malfacilajn bataltaskojn, sed ne mankis ankaŭ amuzaj okazaĵoj. Mi rakontos pri unu el ili.

Jam estis evidente por ĉiuj, ke venas la fino de la milito. La Soveta Armeo proksimiĝis al Berlino. Sed Unua Bulgara Armeo, post la legenda Drava-epopeo, plu tenis siajn poziciojn en la tranĉeoj sur la bordo de Dravo. Kaj la fronta teatro daŭrigis siajn spektaklojn.

...Estis vespere, en la lastaj tagoj de aprilo. Dum la vespermanĝo la komandanto de 16-a divizio generalo Conju Ganev turnis sin al la gvidanto de nia teatra trupo, la verkisto Aleksandăr Girginov kaj diris:

— Kiel vi scias, jam ĉiunmomente povas veni sciigo pri la falo de Berlino. Morgaŭ, en la antaŭtago de la Unua de Majo, via teatro havas spektaklon. Ĉu ne povus vi tiuokaze prezenti ion novan? Estus tre bone, se en via programo vi trovus lokon por la antaŭstaranta venko!

Post nelonga pripensado kamarado Girginov diris:

— Bone! Ĉi-nokte mi faros mian eblon por verki unuaktan teatraĵon pri la falo de Berlino. Se ankaŭ la kamaradoj-aktoroj konsentos prepari ĝin ĝis morgaŭ vespere, tio estos nia bataltasko honore al la Unua de Majo!

Ni deklaris, ke kun ĝojo kaj fiero ni akceptas la proponon. Girginov petis permeson de la generalo retiriĝi kaj iris al sia loĝejo.

Matene en la difinita horo ni atendis. Nia direktoro alportis la jam pretan teatraĵon, verkitan intence nur por tri roluloj. Ne estis tempo por tralegi ĝin! Ĝis la deka horo ĝi estis multobligita en kvar ekzempleroj kaj ni tuj komencis provludi. Mi estis ĉefregisoro kaj samtempe ludis la ĉefrolon — de hitlera „obergruppenführer“ (altranga oficiro). La teatraĵo estis nomita „La lasta batalo“ kaj loko de la okazaĵo estis „mia“ kabineto.

La verkado de la teatraĵo, la provludado kaj la prezento de tiu spektaklo — ĉio ĉi estis farita en mirinde mallonga tempo — en malpli ol dudek kvar horoj.

La spektaklon ni prezentis en la granda ejo de la loka fajrobrigado, sur improvizita scenejo, farita de niaj soldatoj. La prezentado komenciĝis je la 17.00 horo kaj finiĝis je la 19.00. La teatraĵo estis la lasta ero el la programo. Ni aktoroj ludis tre entuziasme. Ĉio pasis plej sukcese.

Sed la „vera mirindaĵo“ venis post la spektaklo, kiam ni eliris el la „teatro“. Ekstere, antaŭ la konstruaĵo de la fajrobrigado nian publikon, konsistantan el soldatoj kaj oficiroj, konsternis io tute neatendita. Flanke de la pozicio leviĝis ĉielen diverskoloraj raketoj, aŭdiĝis senĉesa pafado.

— Berlino falis! Berlino falis! — de buŝo al buŝo sin portis la ĝoja novaĵo.

Kaj jen, en tiu momento ĉiu, kiu disponis pri armilo, rapidis sendi kelkajn pafojn en la aeron kaj tiel mem meti punkton al la milito! Neimagebla ĝojo plenigis niajn korojn. Ni ĉirkaŭprenis unu la alian kaj reciproke gratulis nin per la granda venko!

La divizia komandanto tuj, estante ankoraŭ sur la strato, ordonis al la stabestro kolonelo Haĝiev urĝe peti de la korpusa stabo detalajn informojn pri la granda evento, tiom longe kaj senpacience atendata de ĉiuj.

Sed la saman vesperon, dum la vespermanĝo en la oficira manĝejo, kie sur la tabloj estis boteloj kun ĉampano kaj regis gaja ekscitiĝo ni eksciis, ke la informo pri la falo de Berlino ne venis el la korpusa stabo. Eĉ la armestabo postulis klarigon pri la okazintaĵo — nome, de kie venis tiu informo fulmrapide disvastiĝinta tra la tuta pozicio. La generalo estis kolera. Vane estis eluzitaj tiom da municioj, krome, estis malbone, ke en la divizion penetras malveraj informoj. Li komisiis al kolonelo Haĝiev kontroli la okazaĵon

kaj elserĉi la kulpulon pri tiu pseŭdonovaĵo. Campanon, kompreneble, ni ne trinkis kaj kun iom malvarmigita entuziasmo ni ekatendis la rezulton. Kaj nur post duonhoro jen kio evidentiĝis:

En nia teatraĵo „La lasta batalo“, dediĉita al la antaŭstaranta falo de Berlino, „rolis“ ankaŭ radio. Per la radio nia „obergrupennführer“ aŭdas la novaĵon, ke „Berlino falis“, post kio li panikas. Tiun radioelsendon, tre sukcese imititan per kartona funelo de unu el niaj aktoroj, aŭdis la gardostaranta soldato, kiu staris ekstere, ĉe la ŝtuparo de la observa incendituro. Li ne konjektis, ke tiu sciigo estas parto de la teatraĵo, kiun oni en la momento ludas sur la scenejo. Opiniante ĝin vera informo per la radio, li tuj iris supren kaj sciigis la ĝojan novaĵon al la telefonistoj. Tiuj

lastaj, havante telefonligon kun ĉiuj poziciaj trupoj de la divizio apud rivero Dravo, rapide transdonis la novaĵon por ĝojigi ĉiujn.

Tiel en daŭro nur de kelkaj minutoj la „novaĵo“ pri la falo de Berlino disvastiĝis per la diviziaj telefonkabloj kaj ĝojflamigis la korojn de ĉiuj batalantoj. Por iamaniere esprimi sian grandegan ĝojon pro la venko, ĉiuj pafis en la aeron kaj ornamis la ĉielon per diverskoloraj raketoj.

Tio okazis en la printempo de 1945. Kaj nur ses tagojn pli poste Berlino efektive falis, sed nun jam ĝin konkeris ne la fronta teatro „Tribuno“, sed la granda, nevenkebla Soveta Armeo.

ANANI ANEV,
aktoro el la Ŝtata Muzika
Teatro „Stefan Makedonski“

Nia E-junularo raportas

Jam pasis kvin jaroj depost la 40-a Nacia E-Kongreso de BEA (Plovdiv, 1980). La okazinta en ties kadro junulara konferenco elektis novan estraron de Bulgara Esperantista Junularo (BEJ).

Kio fakte okazis dum tiu kvinjara periodo? Ĉu BEJ bone laboris, ĉu ĝi havis sukcesojn — naciajn kaj mondskalajn? Pri tio ni povis informiĝi dum la konferenco de bulgara E-junularo en Haskovo, okazinta la 2-an de aprilo 1985, post la XVIII Nacia Revuo de E-Parolo kaj Kanto. Pri la agado de BEJ raportis ties ĝisnuna prezidantino Steliana Dimitrova. Reprezentantoj de CE de BEA estis Kunĉo Vălev — ĝenerala sekretario de BEA, Donĉo Ĥitrov — ĉefredaktoro de revuo „Bulgara Esperantisto“ kaj Draguŝko Petrov — sekretario de la Sekcia Konsilio ĉe BEA.

St. Dimitrova faris sian raporton antaŭ nur ĉirkaŭ dudeko da ĝejunuloj, pro malbona anticipa organizado kaj informado inter la junularo en la lando. Ĉeestis reprezentantoj el Sofio, Plovdiv, Haskovo, Gabrovo, Smoljan kaj ankaŭ la fremdlandaj esperantistoj Gyula Szentpéterie el Hungario kaj Abdulaj Togola el Malio — studentoj en Sofio.

La junularo ĉiam estis la granda espero de la socio. Dum la Internacia Jaro de Junularo ĉiuj rigardoj estas direktitaj al ĝi, al ĝiaj sukcesoj kaj malsukcesoj, al ĝia agado kaj evoluado. Kiaj estis la sukcesoj de BEJ dum tiuj jaroj? Ni komencu per la tradicia Revuo de E-Parolo kaj Kanto. Tiu bela tradicio multe evoluis dum la lastaj jaroj. La nombro de partoprenantoj ĉiujare kreskis — de 450 en Pazarĝik ĝis ĉirkaŭ 800 en Haskovo ĉi-jare, kie ĝejunuloj-esperantistoj el la tuta lando manifestis siajn talentojn.

Dum la lastaj kelke da jaroj, oni organizis kuŝe kun la Komsomolo internaciajn E-labor-

brigadojn kun multnombra partopreno de fremdlandanoj.

En la pasinta Asembleo „Standardo de la Paco“ (1982) partoprenis grupo de bulgaraj infanoj-esperantistoj, kiuj prezentis interesan esperantlingvan programon. Ĉi-jare oni denove organizas partoprenon de E-grupo en tiu grava kaj impona infana forumo.

La seminarioj por junaj E-kadruloj el la tuta lando (ĉefe pri organizaj aferoj) okazis trifoje en Pisanica. En 1984 la seminarion partoprenis ankaŭ reprezentantoj el Hungario, GDR kaj ĈSSR.

Reprezentantoj de BEJ partoprenis ankaŭ diversajn internaciajn aranĝojn eksterlande — TEJO-kongresojn, seminariojn, renkontiĝojn ktp.

La estraro de BEJ ne prisilentas siajn malperfektaĵojn kaj mankojn: nesufiĉaj, maloftaj kontaktoj kun la junularaj societoj kaj grupoj en la lando, malgranda nombro da ĝejunuloj, parolantaj sufiĉe bone Esperanton ktp.

La raporto de Steliana Dimitrova estis vigle pridiskutita. La ĉeestantoj faris utilajn proponojn (iuj el ili rilatas novan organizan strukturon de BEJ), kiujn la nova estraro de BEJ, ĉe-kape kun sia nova prezidantino Cvetka Miteva devas realigi en sia estonta laboro. Ni esperu, ke la nova estraro, kiu konsistas nun el 7 membroj (antaŭe estis 5) per la helpo de l'membroj de la komitato — el diversaj regionoj de Bulgario, daŭrigos la bonajn tradiciojn de BEA kaj tiros utilajn konkludojn el la ĝisnunaĵoj eraroj.

Tutkore ni bondeziras sukcesan laboron al la Bulgara Esperanto-Junularo kaj al ties nova estraro!

Mariana ELENOVA

Dua disertacio pri interlingvistiko



En 1976 Detlev Blanke (Berlino, GDR) doktoriĝis per disertacio pri komparo de la vortfarado de la germana lingvo kaj Esperanto. La titolon „doktor scientiae philosophiae“ (Dr. sc. phil.) li akiris per defendo de dua doktora disertacio la 13-an de februaro 1985. Ĝi havas la titolon „Bazaj demandoj de la evoluo de planlingvoj — sub aparta konsidero de Esperanto“.

La Senato de la Scienca Konsilantaro de Humboldt-Universitato en Berlino akceptis la laboraĵon kiel „disertacion B“, t. e. en kelkaj landoj „habilitacia disertacio“ aŭ disertacio por fariĝi „doktoro de sciencoj“ (Soveta Unio) aŭ „Kandidato de sciencoj“ (Hungario, ĈSSR). Per tiu en GDR plej alta scienca grado al la sukcesinto estas principe malfermita ĉiu scienca universitata aŭ akademia kariero — se ekzistas ŝtata intereso pri la fako.

La ekspertizojn verkis la universitataj profesoroj Georg Friedrich Meier (komunikadscienco, ĝenerala lingvistiko, Humboldt-Universitato), Johannes Klare (romanistiko, Humboldt-Universitato) kaj Frank Häusler (slavistiko, Pedagogia Altlernejo Magdeburg). Versajne la unuan fojon en la historio de lingvoscienco oni donis tiun gradon por la fako „interlingvistiko“. Per tio — almenaŭ nomenklature — oni kreis precedentan kazon.

La disertacio konsistas el du volumoj:

I: la teksto (417+2 p.), II: notaro (pli ol 500 notoj) kaj 2 000-titola bibliografio ordigita laŭ 23 sekcioj (kun materialo i. a. el 280 etnolingvaj kaj planlingvaj revuoj).

Valoras substreki, ke temas pri libro traktanta ne precipe Esperanton, sed precipe la planlingvistikon.

Ĉirkaŭ 75% de la tekstoj traktas la planlingvan fenomenon kun ĝiaj diversaj aspektoj, kaj nur 25% — aparte Esperanton. 33% de la bibliografio entenas esperantologiajn titolojn.

La aŭtoro klopodis kritike prilabori kaj utiligi la ĉefan internacie akireblan materialon ĝis la fino de 1983.

Elirante el la rilatoj inter lingvoplanado kaj planlingvo li traktas la „artefaritan“ aŭ la „konscian“ en la lingvo-evoluado, tre detale pridiskutas la diversajn terminojn (pli ol 20) ĉirkaŭ la ĉefa termino „planlingvo“ kaj prezentas konsiderojn kaj materialojn pri la nombro kaj ĉefaj motivoj de la ekestigo de planlingvoj. Detala ĉapitro prezentas la kontraŭdirajn kriteriojn de lingvistoj, laŭ kiuj oni konstruu planlingvojn. Diversaj klasifikoj estas kritike prezentataj kaj kompletigitaj per la klasifiko „laŭ komunikada funkcio“ (planlingvaj **projektoj**, **semiplanlingvoj**, **planlingvo** (= Esperanto).

Sekvas traktado de ĉefaj pazigrafioj, aprioriaj kaj aposterioriaj planlingvaj projektoj (resp. semiplanlingvoj) kaj Volapuko. Aparte detale estas traktitaj la sistemoj de la naturalisma skalo kaj tre detale laŭ originalaj dokumentoj — la historio de International Auxiliary Language Association (IALA).

100 paĝoj traktas pri Esperanto, la lingvopolitika rolo de Zamenhof, la strukturo kaj lingvaj ecoj de Esperanto (grafemoj, fonemoj, morfemaro, vortfarado, vorto kaj signifo, strukturo de la leksiko, sintakso, lingvo-tavoloj kaj stiloj, evoluo-stabileco-normo), lingva komunumo de Esperanto kaj apliko de Esperanto en la praktiko.


Tre mallonga ĉapitro pri rilatoj inter planlingvoj kaj interlingvistiko finas la libron.

La traktado de la ĉefaj planlingvaj sistemoj akcentas pli forte — ol ĝis nun farita — la komunikadan funkcion kaj aliajn socilingvistikajn aspektojn de la planlingvaj movadetoj.

Sendube la ĉapitro pri Esperanto devus esti pli ampleksa. Sed drasta spaclimigo tion malhelpis. Eventuale la libro efikos stimule tiel, ke la eldonejo pretos publikigi apartan monografion pri Esperanto. Jam ekzistas flanke de la eldonejo konsideroj por traduko en Esperanto aŭ nacilingven.

La libro estas aparte riĉe bibliografiata pro du kaŭzoj: a) La temo en nacilingvaj medioj renkontas ofte skeptikecon. Detala utiligo kaj prezento de faka literaturo montras la maturecon de la temo. b) Se jam por informitaj interlingvistoj kaj esperantologoj ofte estas nekonataj multaj tre specialaj valoraj studoj, des pli nekonataj ili estas por nove interesigitaj sciencistoj, laborantaj en nacilingva medio. Ili havos rapidan starton pro la pretigita kaj tralaborita bibliografio, versajne la plej ampleksa kaj plej moderna aktuale internacie akirebla. La aŭtoro planas prilabori pli ampleksan bibliografion surbaze de sia 6000-titola sliparo.

(La recenzon sendis **Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR**)



ĈIU HONESTA HOMO...

(El la intervjuo de Vladimir AKSJONOV, prezidanto de la Komitato de Junularaj Organizaĵoj en USSR, publikigita en revuo „Vek dvadcatij i Mir“)

— La kuranta 1985 estas proklamita fare de UN Internacia Junulara Jaro. Plej grava evento por la gejunuloj de nia planedo sendube estiĝos la XII Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj en Moskvo. Kiaj estas la taskoj de la festivala movado kiel siaspeca formo de kunlaborado de la junularo el diversaj landoj?

— Miaopinie oni povus formuli tute konci-ze la taskojn de la tutmonda festivala agado: edukado de la gejunuloj en spirito de paco, amikeco kaj estimo al la aliaj popoloj. Espri-mante la strebadon de la juna generacio de nia planedo defendi siajn rajtojn, la tutmondaj forumoj unuigas la demokratian junularon kaj la studentojn en la batalo kontraŭ nova mondmilito, por justa kaj daŭra paco inter la popoloj. Unu el la plej karakterizaj trajtoj de la preparata XII Tutmonda Junulara Festivalo en Moskvo estas la altiro al ĝia preparproceso de junularaj kontraŭmilitaj grupoj kaj unuiĝoj.

La kontraŭmilita agado de la socio estas karakterata trajto de nia nuntempo. La homoj protestas kontraŭ la minaco de nuklea milito ne nur pro la reala danĝero de neniigo de la vivo sur la Tero, sed ankaŭ pro tio, ĉar la militemuloj elspezas por vetarmado grandegajn sumojn, dum la liberigintaj popoloj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko bezonas lernejojn, malsanulejojn, loĝejojn kaj plibonigon de iliaj vivnivelo kaj nacia ekonomio. Guste pro tio la kontraŭmilita karaktero de la antaŭstaranta festivalo respondas al la spirito de la festivalaj tradicioj. Tion esprimas ankaŭ la slogano de la XII Tutmonda Festivalo de la Junularo kaj Studentoj — „Por antiimperiisma solidareco, por paco kaj amikeco!“

Apartan signifon akiras la kontraŭmilita temo de la estonta festivalo lige kun la celeb-rado de l' 40-jariĝo de la Granda Venko super faŝismo.

La Internacia Junulara Jaro kaj la XII tutmonda junulara festivalo koincidas ankaŭ kun la 10-a datreveno de subskribo de l' Konkluda Akto de la Tuteŭropa Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaborado en Eŭropo. Signifa estos la festivala kontribuo por realigo de la nobla devizo de la Internacia Junulara Jaro: „Partopreno, evoluo, paco“.

La tutmondaj festivaloj ĉiam estas impresaj manifestacioj de solidarico kaj amikeco de la monda junularo. Ili ĉiam estas vera festo de amikaj interrilatoj de miloj da gejunuloj diversnaciaj, kun malsama mondkoncepto, dum kiuj oni neniam malatentas la plej akrajn problemojn de la nuntempo. En tio, laŭ mi, ankaŭ esprimiĝas la tre alta signifo de la tutmondaj festivaloj: firmigi en la konscio de gejunuloj kredon en siaj propraj fortoj, en la estonteco, en sia antaŭdestino, en siaj talentoj; la konvinkon pri la neceso defendi la vivon sur la Tero por si mem kaj por la estontaj generacioj spite al la kultivata en la Okcidento sento de necerteco kaj de neevitebleco de tergloba militkonflikto.

Memore al Rubljov

Sergej Grigorjeviĉ Rubljov estis laŭprofesie inĝeniero, sed kiel esperantisto li estis fama instruisto, tradukisto, stilisto. Liaj lernolibroj kaj la volumo kun esperanta traduko de la famegaj fabloj de Krilov (eldono de UEA), estas vaste konataj.

Mi estis dum longaj jaroj proksima amiko de la neforgesebla Sergej Grigorjeviĉ. Memore al li mi deziras rakonti pri iu momento el mia propagandista agado, kiam mia amiko donis al mi tre valoran helpon.

Dum mia parolado antaŭ neesperantista publiko iu el la ĉeestantoj ne kredis, ke en Esperanto oni povas esprimi ĉiujn nuancojn de la penso, kiel en la t. n. naturaj lingvoj. Por subteni sian tezon, li rakontis anekdoton pri vendisto kaj aĉetanto. Ili ambaŭ tre ĝentile turnis sin unu al la alia. La aĉetanto demandis la vendiston pri la prezo de vortaro uzante KVIN diversajn ĝentilajn esprimojn. La vendisto respondis al la aĉetanto pri la prezo de la vortaro, uzante eĉ DEKKVAR ĝentilajn esprimojn. (Kompreneble, la esprimoj estis ruslingvaj, sed ilin oni povus renkonti en multaj aliaj lingvoj). Finante la anekdoton, mia oponanto ankoraŭfoje esprimis sian profundan konvinkon, ke en Esperanto ne eblas trovi tiom da nuancaj esprimoj pri la sama temo.

Mi promesis, ke en sekva kunveno mi preparos necesajn ĝentilajn esprimojn, samvalorojn al la uzitaj de li, ĉi-foje jam en Esperanto.

La sekvan tagon mi vizitis mian amikon Sergej Grigorjeviĉ Rubljov kaj informis lin

pri la tezo de tiu kontraŭulo de Esperanto. Li diris „Ĉio estos farota“ kaj plenumis sian promeson.

Kaj li prezentis al mi anstataŭ la KVIN esprimojn de la aĉetanto en rusa lingvo DEK-SEP esprimojn en Esperanto; anstataŭ DEK-KVAR esprimojn de la vendisto en rusa lingvo — TRIDEK SEP esprimojn en Esperanto!

Jen ili: afable, agrable, bonkaze, ĝentile, kompleze, respektate, estimplene, plaĉe, delikate, servoprete, bontakte, taktoplene, konvene, dece, favore, bonkondute, simpatie.

Kaj jen la ĝentilaj respondoj: malkare, malmultekoste, kelkajn kopekojn, groŝojn (pfenigojn, centimojn, pencojn. . .), facile akireble, malkarege, preskaŭ donace, preskaŭ senpage,

laŭ prezo favora, bonŝance — malkare, supermalkare, ekstra malkare, ultramalkare, laŭ prezo mizera, senpreze, etpreze, preskaŭ senmone, laŭfabela, fantazia prezo, laŭ prezo agrabla, trioble malkare, laŭ malgranda elspezo, preskaŭ senkoste, admirinde malkare, tute senflato kun multa rabato, sen surrogato kun granda rabato, por festotago — malmulta pago, ĝentile kaj senavare, kaj tute malkare, por rekta komplezo — malgranda prezo, laŭ dia graco — preskaŭ donaco, en tago bazara laŭ prezo malkara.

— Ĉu Esperanto estas malriĉa? — diris Rubjov.

Odeso, USSR

E-veterano NAUM
SIGAL (PODOLSKIJ)

HOMOJ, GARDU LA VIVON!

La 3-an de aprilo j. k. en la salono de la Domo de Soveta Scienco kaj Tekniko la sofiaj esperantistoj ĉeestis solenaĵon dediĉitan al la 40-jara datreveno de l' venko de la soveta popolo kaj la tuta progresema homaro super la hitlera faŝismo kaj japana militarismo. En la nomo de la organizantoj raportis Haim Levi — vicprezidanto de UE de BEA kaj Vadim Arĥipoviĉ — vicdirektoro de la Domo de Soveta Scienco kaj Tekniko.

En sia emocia parolo Haim Levi diris:

—La 9-an de majo 1945 la soveta armeo fermis unu el la plej malĝojaj paĝoj de la monda historio, metis finon al la terura inkubo de la bruna pesto kaj malkovris antaŭ dekoj da landoj kaj popoloj la vojon al libera disvolvigo.

Vadim Arĥipoviĉ emfazis:

— Okcidente oni riproĉas nin, ke ni — en Sovetunio — tre multe parolas pri la pasinta milito. Mi diras nur, ke en la Soveta lando en ĉiu dua aŭ tria familio iu ne revenis de la fronto. Kiam la usona televido elsendis nian serian dokumentan filmon „La granda patrolanda milito“, la usonanoj nomis ĝin „La nekonata milito“. Nekonata por ili, sed en ĝi pereis pli ol 50 milionoj da eŭropanoj.

Post la paroladoj Anani Anev, aktoro el la Stata Muzika Teatro „Stefan Makedonski“, rakontis rememorojn pri sia partopreno en la Patrolanda Milito, kiel aktoro en la fronta teatro „Tribuno“ ĉe Unua Bulgara Armeo.

La koncertan programon, majstre preparitan de Belka Beleva, aktorino kaj lektorino en la Supera Instituto de Teatroarto, gvidis bone Nevjana Krăsteva.

La enhavo de la spektaklo „Militpoŝto“ profunde impresis la publikon. Rolis la aktoroj el la Bulgara Esperanto-Teatro Veneta Zjumbjuleva, Nikolaj Uzunov, Nikolaj Iva-

nov kaj la merita aktoro Vladimir Smirnov. Ili tralegis leterojn de tiu tempo. Leteroj de patroj, filoj, edzoj. De ili, de la pereintoj, restis nur leteroj, lastaj leteroj, al kiuj oni povas aldoni nenion. La tempo senkolorigis la inkon, la nigra krajono paligis, la adresoj estas apenaŭ legeblaj. Tiuj leteroj estas historio, sed historio, kiun oni ne devas forgesi! Jen estas kelkaj fragmentoj de ili:

Pereinta soveta soldato skribas al sia patri-no: „Tion, kion mi ne povis fari, faros la kamaradoj. Mi pereas kiel via filo, panjo, kaj kiel filo de la patrujo. Mi estas ukraino, sed la blankrusia tero ankaŭ akceptos min kiel sian filon.“

La soldato Werner el la faŝista armeo mallaŭdas la militon: „Oni ŝtelis nian junecon, sed la estonta hontego nin ne tuŝos.“

La publiko tondre aplaudis la majstran plenumon de la kantistino Irina Ĉmiĥova kaj de la aktorinoj Luna Davidova kaj Cvetana Văzвъzova. Sin prezentis ankaŭ la kantisto el la Stata Muzika Teatro Veselin Damjanov.

Siajn rememorojn pri la milito rakontis ankaŭ la sekretario de UE de BEA Ivan Peev — volontulo en la milito. Li memorigis iujn ciferojn pri la Dua Mondmilito:

- Gi daŭris 6 jarojn kaj 1 tagon
- Gin partoprenis 61 landoj
- Dum la milito en Sovetunio estis ruinitaj 1710 urboj, 70 000 vilaĝoj, 32 000 entreprenoj
- Pereis 20 300 000 sovetaj civitanoj
- Usono donis 405 000 viktimojn, Grandbritio — 375 000.

Post iu nova mondmilito eble ne restos vivaj homoj, por povi fari tiun tre malĝojan bilancon.

Maria JANKOVA

REALIĜIS ANKORAŬ

UNU REVO

En la pasinteco la blinduloj en Bulgario vivis en fizika kaj mensa nokto — ili estis analfabetoj. Sed en la nokto venis honorinda homo — kun klarvida menso, kun granda, homeca, nobla koro — profesoro Ivan Sismanov, ministro de la klerigo. En 1905 laŭ lia iniciato en Sofio estis malfermita lernejo por blinduloj („Ŝtata Instituto por Blinduloj“). Per la kreo de tiu unua tiuspeca lernejo en la balkanaj landoj, ĝi estiĝis stelo en la nokto de la nevidantoj, malfermis iliajn mensajn okulojn. Tamen tio ne sufiĉis — post la fino de la lernejo la ŝtato ne plu zorgis pri ili, la registaro neglektis la sorton de la blinduloj.

Post la venko de la socialisma revolucio en Bulgario (septembro 1944) por la blinduloj komenciĝis nova vivo — la rilato de la registaro al la nevidantoj estis favora — oni aprobis leĝojn, kiuj rajtigas la Asocion de Blinduloj en Bulgario (ABB) krei proprajn produktadentreprenojn por garantii laboron al la nevidantoj.

Dum pluraj jaroj, pro solvendaj urĝaj problemoj oni ne havis sufiĉe da tempo por Esperanto. Sed antaŭ 7 jaroj la E-agado inter blinduloj reviviĝis — estis fondita E-sekcio ĉe BEA, oni komencis presi E-lernolibrojn (en brajlo), nemultan literaturon kaj surbendigi la revuon „Bulgara Esperantisto“. Realigis multaj revoj de la nevidantoj. Venis tempo por pli grava paŝo. La E-sekcio proponis al la Plenuma Buroo de ABB antaŭvidi eldonadon de trimonata brajla revuo en Esperanto. Kia estos la celo, la utilo de tiu revuo? Unue — ĝi varbados novajn esperantistojn el inter la blinduloj; due — ĝi plialtigos la nivelon de ilia lingvoscio; trie — ĝi konigos al la blindaj esperantistoj en eksterlando pri la nuna vivo de la blinduloj en Bulgario, kie ne plu estas blindaj stratvendistoj, drinkejmuzikistoj, almozuoj.

En la buĝeto de ABB por 1985 estas planitaj la elspezoj por eldonado de tiu revuo — kiel aldoni al la ĉeforgano de ABB „Zari“ („Aŭroroj“).

La unua numero de la nova revuo titolita „Esperanta Fajrero“ jam estas ĝojiga fakto. Ĝi estas dissendita ankaŭ eksterlanden.

Todor ŜOŠEV

SUKCESA EKONOMIA AGADO

La jubilea 1984 estis sukcesplena, fruktodona por la ekonomia agado de BEA. Oni konsiderinde superplenumis ĉiujn kalkulincojn.

Ne eblas indiferente trakti la bonegajn re-

zultojn: la amplekso de la varproduktado kreskis kompare kun 1983 per 8 370 000 lv., t.e. per 84,4% kaj la bilanca profito per 1 771 000 lv., t.e. per 63,8%. Koncerne la bazajn kalkulincojn por 1984 la rezultoj estas tre bonaj. La indicoj pri amplekso estis superplenigitaj per 39,7% kaj pri la bilanca profito — per 40,2%.

Nur por 1984 nia tuta ekonomia agado deponis en la ŝtata enspezo impostsumojn kaj pagojn al la Komunumaj Popolaj Konsilantaroj — 2 163 000 lv.! Al CE de BEA estas disponigitaj konsiderinde pli da monrimedoj, samkiel al la ĉefurba kaj distriktaj estraroj de nia Asocio.

La estraro de la Ĉefa Ekonomia Direkcio „Globus“ esprimas sian kredon, ke la produktadprogramo por la kuranta 1985 estos superplenigita ĉe pliboniganta kvalito. Garantio por tio estas la sindona laboro de niaj entreprenoj kaj bazoj.

J. JORDANOV

VII RENKONTIGO DE PACDEFENDANTOJ EN PARDUBICE

La Esperanto-rondeto ĉe DK RMS DUKLA okazigis de la 29-a ĝis la 31-a de marto 1985 (sub la aŭspicio de la Distrikta Packonsilio) la VII-an Internacian Renkontigon de Pacdefendantoj en la orientbohemia urbo Pardubice. Partoprenis pli ol 400 esperantistoj el Eŭropo kaj unu gasto el Kanado.

La pacrenkontigo estis solene inaŭgurita per programo de esperantista muzikgrupo kaj per deklamado de versoj de Jiří Kořínek en Esperanto. La prezidanto de ĈEA d-ro Jermář bonvenigis la ĉeestantojn nome urbestron k-don Jaroslav Šimon, la prezidanton de la Distrikta Packonsilio docenton d-ro Jiří Kovář, la prezidanton de MEM d-ro Imre Pethés kaj la gastojn el Aŭstrio, Bulgario, Francio, GDR, Kanado, Hungario kaj Sovet-Unio.

En sia salutparolo la urbestro Jaroslav Šimon substrekis, ke la VII-a pacrenkontigo okazas en la jaro de 40-a datreveno de la venko super faŝismo.

La prezidanto de DPK docento d-ro Jiří Kovář, laŭprofesie kuracisto-kirurgo, parolis pri sia sperto en la Dua Mondmilito kaj en la Korea milito.

Veneta Baleva el Bulgario, redaktorino en revuo „PACO“, diris ke ni ne devas atendi ĝis kiam venos apokalipso, tiam estos jam malfrue por pacdefendo. Hodiaŭ ankoraŭ estas blua ĉielo kaj pura akvo. Ni ĉiuj luktu por la paco!

La partoprenintoj en la VII Pacrenkontigo aprobis Proklamon al ĉiuj esperantistoj en la mondo.

Milada HEMERKOVA



DEZIRAS KORESPONDI

BULGARIO

Mariana Georgieva (22-jara) — 8600 Jambol, str. „Krali Marko“ 29, vh. 2, ap. 32 — kun ĉi pri ĉi.

Radka Ruseva (15-jara, lernantino) — Dimitrovgrad, Ĥaskovski okr., str. Majakovski, bl. 7, vh. A, ap. 9 — kun ĉi pri ĉi.

Tonka Todorova (37-jara, instruistino) — 7100 Bjala, Rusenski okr., str. „Car Osvoboditel“ 12 — kun ĉi pri ĉi.

Hristinka Milčeva (46-jara, vidviro kasistino), — Loveĉ, blok 202 vh. E, et. 2, ap. 5 — kolektas sapojn kaj parfumojn.

Tenjo Tenev (22-jara) — 8600 Jambol, str. „At. Kratunov“ 125 — kun ĉi, pri ĉi.

Du 16-jaraj lernantinoj-amikinoj Jordanka Spasova — Dimitrovgrad, str. „V kongres“, bl. 10, vh. A, ap. 33, kaj Tanja Kojnova — Dimitrovgrad, str. „Baba Paraŝkeva“ bl. 3, vh. B, ap. 4 — dez. kor. por perfektigi Esperanton, pri fremdaj lingvoj kaj muziko.

ĈEĤOSLOVAKIO

Lenka Kuskova (17-jara, lernantino) — 50 801 Horice, Rod Lipon 1665 — kun ĉi pri skiado, vojaĝado, interŝ. BK.

Irena Jiraskova (24-jara, instruistino) — 54 233 Rytne, v. Podkrkonosi 647 — pri pentrado, desegnaĵo, sporto, kolektado de infanpentraĵoj.

RUMANIO

Nagy Akos (14-jara lernanto) — 4193 Ulies, str. Principala 50, Jud. Harghita — dez. kor. kun genaboj; kolektas BK.

NI KONDOLENCAS

La 10-an de novembro 1984 subite forpasis nia sindona samideano PETĀR IVANOV POPNIKOLOV — multjara aganto de la Sofia urba E-societo, kursgvidanto kaj aktiva populariganto de Esperanto!

La 7-an de marto ĉi-jare mortis d-ro HIDEO SHINODA — direktoro de la Shinoda hospitalo en Jamagata-ĉi — Japanio.

D-ro Hideo Shinoda estas tre bone konata al la bulgara esperantistaro — li vizitis nian landon dum la Universala Kongreso en Varna 1978. Precipe la medicinistoj-esperantistoj konas bone lian viglan kaj aktivan karakteron, ankoraŭ kiel membro kaj honora prezidanto de Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA), kiel fondinto de UMEA-premio kaj membro de la redakcio de Medicina Internacia Revuo.

Ni profunde kliniĝas antaŭ la hela memoro de d-ro Hideo Shinoda!

La Redakcio

ENHAVO

D. ĤITROV. Esperanta printempo en Ĥaskovo II, 2,3,4	
***** Al nia 41-a Kongreso	1
***** Rezultoj de la konkurso „Penjo Penev“	5
Kr. KARUCIN. Jubilea scienca sesio	6, 7
***** XVIII Konsultigo de SLEO-j	7
N. LJUBENOVA. Nia honora prezidanto	8, 9
L. KOLEVA. Vivo el festoj	9
R. BANĈEVSKI. Plenkunsido de la Sofia Urba E-Organizaĵo	10
An. ANEV. „La lasta batalo“	10, 11
M. ELENOVA. Nia E-junularo raportas	12
***** Dua disertacio pri interlingvistiko	13
***** Ĉiu honesta homo	14
***** Deziras korespondi	III
H. C. ANDERSEN. Regidino sur pizo	IV
S. MARŠAK. La ekspedaĵo	IV

Sur la unua kovrilpaĝo:

Junaj partoprenantoj en la XVIII Nacia Revuo

de E-Parolo kaj Kanto, Ĥaskovo

Foto: Lada MILKOVA

KUNLABORANTOJ, ATENTU!

Se vi volas sendi kontribuojn por „BE“, ĝi estu konciza, verkita en bona lingvo, klare tajpita aŭ mane skribita, kun duobla interlinia spaco kaj margeno (sen mallongigoj, sen tutaj vortoj tajpitaj per majuskloj). La materialoj ne estu pli longaj ol 60 tajpitaj linioj, nur en tre gravaj kazoj — ĝis 90 linioj, sur blankaj paperfolioj de normala formato. Ĉiu tajpita linio konsistu el 65 tajposignoj (inkluzive la intervortajn spacojn).

La redakcio akceptas la originalan (unuan) ekzempleron de la tajpaĵo, ne la kopion. Skribu klare viajn nomon kaj kompletan adreson en nacia lingvo!

Korespondadojn pri okazintaj aranĝoj oni sendu ĉiam tuj post la aranĝo. La grupfotoj estu interesaj, movoplenaj, bonkvalitaj (prefere nigra-blankaj), en poŝtkarta formato.

Limdato por kontribuadoj: La materialoj venintaj ĝis la 15-a de ĉiu monato, aĉeros en „BE“ post du monatoj.

La redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn!

KONKURSO „VELIKO TĀRNOVO“

DE de BEA — Veliko TĀrnovo, organizas konkurson pri la temo „Veliko TĀrnovo“. Branĉoj: 1) Originala prozo; 2) Originala poezio, 3) Kanto (originalaj teksto kaj muziko)

Premioj por ĉiuj branĉoj: I-a premio — 100 levoj, II-a premio — 70 levoj, III-a premio — 50 levoj.

La konkurso estas anonima. La verkojn oni subskribu per pseŭdonimo. Lasta dato por ricevo de la manuskriptoj — 1-a de decembro 1985. (Validas la poŝta stampo).

Adreso: Bulgario, 5000 Veliko TĀrnovo, DE de BEA, P. K. 266 — por la konkurso.

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BĀCEV, Vasil BOROVIANSKI, Radoslav DOJĈINOV, prof. d-ro Kiril POPOV, DimitĀr HAĜIEV, KrĀstju KARUCIN.

Administranto — Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Cirilo kaj Metodio“ — I grado Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“
Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario P. K. 66
tel. 31-70-19 1 000 Sofio
Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117



REGIDINO SUR PIZO

Estis iam reĝido, kiu volis edziĝi kun reĝidino, sed li nepre volis, ke tio estu vera reĝidino. Li travojaĝis la tutan mondon, por trovi tian, sed ĉie troviĝis ia kontraŭaĵo. Da reĝidinoj estis sufiĉe multe, sed ĉu tio estas veraj reĝidinoj, pri tio li neniel povis konvinkiĝi: ĉiam troviĝis io, kio ne estis tute konforma. Tial li venis returne hejmen kaj estis tre malĝoja, ĉar li tre deziris havi veran reĝidino.

Unu vesperon fariĝis granda uragano: fulmis kaj tondris, forte pluvegis, estis terure. Subite oni frapetis je la urba pordego, kaj la maljuna reĝo iris por malfermi. Montrigis, ke ekstere antaŭ la pordo staras reĝidino. Sed, ho mia Dio, kiel ŝi aspektis pro la pluvo kaj la ventego! La akvo fluis de ŝiaj haroj kaj vestoj, kaj versiĝis en la bekojn de la ŝuoj, kaj denove elen. Kaj ŝi diris, ke ŝi estas vera reĝidino.

— Nu, pri tio ni tre baldaŭ konvinkiĝos! — pensis la maljuna reĝo. Li tamen nenion diris, sed iris en la dormoĉambron, elprenis ĉiujn litaĵojn kaj metis unu pizon sur la fundon de la lito. Post tio li prenis dudek matracojn, metis ilin sur la pizon, kaj poste metis ankoraŭ dudek lanugaĵojn sur la matracojn. En tiu lito la reĝidino devis dormi dum la nokto.

Matene oni ŝin demandis, kiel ŝi dormis.

— Ho, terure malbone — diris la reĝidino. — Preskaŭ dum la tuta nokto mi ne povis fermi la okulojn! Dio scias, kio estas en mia lito! Mi kuŝis sur io malmol, kaj mia korpo pro tio fariĝis blua kaj bruna! Estis terure!

Per tio oni povis vidi, ke ŝi estas vera reĝidino, ĉar tra la dudek matracoj kaj la dudek lanugaĵoj ŝi sentis la pizon. Tiel delikatsenta povis esti nur vera reĝidino!

Tiam la reĝido edziĝis kun ŝi, ĉar nun li sciis, ke li havas veran reĝidino; kaj la pizon oni metis en la muzeon, kie oni ankoraŭ nun povas ĝin vidi, se neniu ĝin forprenis.

Vidu, tio estis vera historio.

LA EKSPEDAJO

Forsendis virin' ekspedaĵon:

pianon,
divanon,
litaĵon,
sitelon,
ombrelon,
tapeton,

kaj nigran malgrandan hundeton,
kaj de la koncerna instanco
ŝi tuje ricevis kvitancon,
ke donis ŝi la ekspedaĵon:

pianon,
divanon,
litaĵon,
sitelon,
ombrelon,
tapeton

kaj nigran malgrandan hundeton.
Jam estis al trajn' transportita
kaj en ŝarĝvagono lokita
la ŝarĝo de la ekspedaĵo:

piano,
divano,
litaĵo,
sitelo,
ombrelo,
tapeto

kaj nigra malgranda hundeto.
Sed kiam la trajn' ekveturis
de ĝi la hundeto forkuris.
Nur je la stacio en Bresto
rimarkis jam oni foreston
laŭ listo de la ekspedaĵo:

piano,
divano,
litaĵo,
sitelo,
ombrelo,
tapeto,

sed kie la nigra hundeto?

En urb' de alveno virina
portisto numero dekkvina
transportis per ĉar' la sendaĵon:

pianon,
divanon,
litaĵon,
sitelon,
ombrelon,
tapeton.

Postpaŝas hundeg', ne hundeto. . .

La hundo — ĝi base ekbojas,

l'virino — ŝi veas kaj ojas:

— Kanajloj! Ne scias skriblegon.

Vi kie akiris hundegon?!

Ŝi puŝas kolere sitelon,

litaĵon,
divanon,
ombrelon,
tapeton. . .

— Redonu tuj mian hundeton!

— Pardonu! Jen via kvitanco!

Piano,
divano,
litaĵo,
sitelo,
ombrelo,
tapeto,

kaj nigra, malgranda hundeto.

Komprenu! Ja povis l'hundeto
elkreski en voj' dum ekspedo.